# Nova mejloŝtono en la Internacia Esperanto-Arkivo

Marc Vanden Bempt

**Dum tri jaroj Internacia Esperanto-Arkivo (IEspA) serĉadis taŭgan ejon por la arkivo kaj fine trovis ĝin. Arkivejo en Diest estas aĉetita la 23-an de aprilo 2024, kun ter- kaj subtera etaĝoj ĉirkaŭ 350 m²-aj. Post iomaj konstruaj laboroj, en 2025 la plena arkivo tie trovos sian novan hejmon. Aldone al la konservejo IEspA posedas apartamenton en la unua etaĝo, kies luantoj kontribuos al la laborkostoj de la arkivo.**

## IEspA: projekto de ĉiu esperantisto

La Internacia Esperanto-Arkivo celas konservadi la Esperanto-heredaĵon[1], ene de la movado. Ĝi ne estas (prunto-)biblioteko, sed vera arkivo, malferma al esplorantoj. Ankaŭ vian propran arkivon ĝi volonte akceptos kaj disponigos al la estontaj generacioj. Tial IEspA estas ĉies propra projekto.

Vi povas transdoni viajn arkivajn dokumentojn rilate al Esperanto jam nun… aŭ en estonta iamo kiam vi ne plu bezonos ilin mem. Sciigu al viaj gefiloj, gefamilianoj la nomon kaj adresojn de IEspA kaj petu ilin transdoni kaj konservigi vian Esperanto-rilatan tutaĵon tie. Tion vi povas fari nun.

## Strategio de IEspA

La strategio de la Arkivo koncentriĝas pri kvar dimensioj, kvar bazaj postuloj: asocio, mono, ejo kaj volontuloj.

La unua dimensio realiĝis jam komence de 2021, kiam persona kaj orfa kolektoj kuniĝis kaj kreis oficialan Asocion sen profitdona celo, gvidata de limigita estraro plene konvinkita pri la graveco de konservado de la Esperanto-heredaĵo. Pri tio eblas legi en la maja numero de 2021.

IEspA akiris kelkcentmil eŭrojn, dank' al etaj, grandaj kaj grandega donacoj. Tiel la dua dimensio iom post iom realiĝas. Ni serĉas pliajn mecenatojn. Ĉu ankaŭ vi opinias la celon de IEspA sufiĉe grava por aktive finance subteni ĝin?

IEspA bezonas pliajn ĉirkaŭ 100 000€, por ne endanĝerigi la realiĝon de la tria dimensio: propra arkivejo. Tiu troviĝos en Diest, historia urbo en la flandra regiono de Belgio. Informoj pri Diest troveblas en Vikipedio, ankaŭ en Esperanto (*https://eo.wikipedia.org/wiki/Diest*).

La kvara dimensio temas pri volontuloj. Ankaŭ tio pozitive evoluas: krom la tri administrantoj (Bert Boon, Roland Rotsaert, Marc Vanden Bempt) de la *aspc* (asocio sen profitdona celo) nun ĉiusemajne kunlaboras du aliaj volontuloj. Pliaj certe bonvenas, ĉu eble vi? Estas taskoj surlokaj, aliaj eblas je distanco. Vi povas kontakti la Arkivon per formularo en ĝia retejo *iespa.eu*

## Finance

La notaria akto subskribiĝos ĉirkaŭ julio 2024, ĝis tiam IEspA aktive serĉas la mankantajn financajn rimedojn. Baldaŭ eblos fizike viziti la ejon, al kiu eble ankaŭ vi malavare kontribuas.

IEspA estas projekto de ĉiu esperantisto, ĝi esperas ke vi helpos la realigadon, finance kaj volontule.

*Subtenoj bonvenas ĉe BE06 7310 5180 2722 - (bic) KREDBEBB. Ĝis la fino de julio Anonimulo al ĉiu donaco aldonos saman sumon (informoj:* www.iespa.eu, info@iespa.eu, *+3250330004), tiel ĉiu via eŭro valoras du. La plej gravaj mecenatoj retrovos sian nomon en memortabulo surloka.*



[1] Laŭstatuta celo: kolekti, arkivi, protekti, administri kaj fari alireblaj librojn, revuojn kaj aliajn dokumentojn en kaj pri Esperanto kaj planitaj lingvoj, maksimume en ilia originala formo (apud diĝitaj kopioj).

Tiu ĉi arkivo celas konservadon kiel heredaĵo, por nelimigita tempodaŭro.